
大乘正定聚

Mahajanaj Anoj Destinitaj al Bodio

加藤教順 / Kato Noriyori

最近では死者は天国に生まれるということ、仏教徒でありながら、葬式などでよく使われる。仏教では天の世界は迷いの六道の一番上のことで、天人には五衰がある。

キリスト教、イスラム教は天国に生まれるというのが神になるのではない。仏教は仏になる教で、その因を生きている今決定しなければならぬ。歎異抄十五章に「来生の開覚は他力浄土の宗旨、信心決定の道なるが故なり」とある。

一切の者を仏にしようという願いを信ずるとするのは、国家や人間を信ずる一般の信とは違って、将来のことでなく、今の信で、もう既に任せきっている信である。

虚実の関係である。「煩惱具足の凡夫、火宅無常の世界はよろづのこと、みなもってそらごとたはごと、まことあることなきに、ただ念仏のみぞまことにておはします」と申されるように、どこまでも私の方は虚であって、そこに仏の実が至りとどくのである。(拙著『真宗読本』36頁、『金蘭簿』170頁参照)

私が虚であると実感できるのは「後生の一大事」、死に対した時である。そこには名誉も金も体力

Lastatempe eĉ budhanoj uzas la esprimon "mortinto naskiĝas en la ĉielo" en la okazo de funebra ceremonio kaj aliaj. Laŭ budhismo la ĉiela mondo situas en la plej alta loko inter la ses sferoj de iluzio. Eĉ ĉielulo mortas post la kvin malbonaj antaŭsignoj.

Kristanismo kaj Islamo diras, ke homo naskiĝos en la ĉielo; tio tamen ne signifas ke homo fariĝos dio. Budhismo estas religio por ke homo fariĝu budho. Por tio necesas ĝuste nun preni sur sin la kaŭzon budhiĝi. La 15-a ĉapitro de Notoj Lamentantaj Herezojn diras, "Atingi nirvanon en la venonta vivo estas la esenco de la Purlandismo de Alia Forto; ĝi estas la principo efektivigebla pere de la definitiva starigo de kredo."

Kredo al la budhan voton, ke ĉiuj homoj fariĝu budho, malsame kiel ordinara kredo al ŝtato aŭ al homo, estas plena konfido apartenanta ne al la estonto sed al la nuno.

Temas pri la rilato de vanteco kaj realeco. "Por malsaĝa estaĵo plena de kleŝoj, en tiu ĉi efemera mondo - tiu ĉi brulanta hejmo - ĉiuj aferoj estas senescepte fikciaj kaj falsaj, tute sen vero kaj sincero. La vokado la Nomon de Amitabo sola estas vera kaj reala." Kiel diras Notoj Lamentantaj Herezojn diras ĉi tiel, miaflanke ĉio estas vanta, sed min atingas la Budha sincereco.

Oni povas havi realan senton pri sia vanteco, kiam venas la plej grava afero de la

も家庭もまったく役に立たないことを知ることができる。それを平常の時、仏さまの智慧と慈悲にお任せするよりほかはない。

親鸞聖人はそのことを「ヨリタノム、ヨリカカルナリ」と教行信証の六字釈の左カナに説かれてある。また唯信抄文意に「聞名念我といふは、聞はきくといふ、信心をあらはすみのり云々」と説かれてあり、大切なことは聴聞である。

本願寺八代目の蓮如上人は「御慈悲にて候ふあひだ、信をうべきなり。ただ仏法は聴聞にきはまることなりと云々」と聴聞を強調された。

昨年十二月二十日の朝日新聞は涙が出てきた。山口県周南市長久寺の有国遊雲君の記事である。小学六年生よりガンを患い、四年目にお母さんの手を握りしめ「もういいよ、お母さんありがとう、みんなにもありがとうって言ってね。ぼくは往きます」と言って息を引き取ったというのである。

親鸞聖人は「往相回向の心行（信心と称名）を獲れば、即のとき大乘正定聚の数に入るなり。正定聚に住するがゆえにかならず滅度に至る。かならず滅度に至るはすなはちこれ常樂なり」（教行信証証之巻）と、力強く述べられている。

vivo, t.e. morto. Tiam oni vere ekscias, ke ne utilas honoro, nek mono, nek korpa forto, nek familio. Tial ni devas nun en ordinara tempo fidi nin mem al la Budha saĝo kaj kompato.

Pri tio La Majstro Ŝinran notis en sia verko "La veraj instruoj, praktiko kaj klarigo", ke la litero "ki" (帰) signifas konfidon kaj sin-apogon. Li ankaŭ en la verko "Notoj pri Esenco de Kredo Sola" klarigis, ke ĉe la frazo "aŭskulti la Budhan Nomon" aŭskulti signifas kredi. La plej grave estas aŭskulti instruojn.

Rennjo, la oka patriarko de la skolo Honganĵi, emfazis aŭskultadon skribante, "Ĉar al vi estas verŝata la Budha Kompato, vi devas kapti kredon. La Budha Darma finfine konverĝas en aŭskultadon."

Kiam mi legis la ĵurnalon Asahi de la 20-a de decembro lastjare, mi larmis. Temas pri la artikolo pri la knabo nomata Arikuni Yuun en la prefektujo Yamaguti. Li malsaniĝis pro kancero, kiam li estis la 6-a klasano de elementa lernejo. Kvar jarojn poste, antaŭ la forpaso, li prenis la manojn de sia patrino kaj diris, "Jam sufiĉas. Dankon panjo! Transdonu mian dankon ankaŭ al ĉiuj ceteraj!"

La Majstro Ŝinran deklaris, "Kiam viv-estaĵoj plenaj de blindaj pasioj realigas la koron kaj la praktikon, kiujn la Budho direktis al ili, ili tuj partoprenas la grupon de mahajanaj anoj destinitaj al bodio; tial ili nepre atingos nirvanon; nepre atingi nirvanon estas do eterna feliĉo." (La 4-a volumo de "La veraj instruoj, praktiko kaj klarigo").